

Ulrich Lins

Gesellschaft für Interlinguistik, Germanio / Germany

Recenzo de la libro

O’Keeffe, Brigid. 2021. *Esperanto and Languages of Internationalism in Revolutionary Russia*.

London: Bloomsbury Academic.

Zamenhof estis civitano de la rusa imperio, la unuaj adeptoj estis rusoj aŭ rusianoj. Ne estas troigo konstati, ke Rusio ludis centran rolon en la historio de Esperanto. Ties aŭtoro vivis en angulo de la rusa, cara regno, li funde sciis la rusan lingvon kaj junaĝe revis pri kariero kiel rusa poeto. Tial ni kun scivolo eklegas en tiu ĉi libro de la usona esplorantino Brigid O’Keeffe, kiu instruas la rusan historion en Brooklyn College de Urba Universitato de Novjorko.¹ Antaŭ ol turni sin al Zamenhof kaj Esperanto, ŝi en siaj ĝisnunaj verkoj dediĉis sin al diversaj aspektoj de la rusa historio. Pasintjare ŝi publikigis studon pri la “multetna Soveta Unio kaj ĝia pereco”. La tie ĉi prezentita libro komenciĝas ĉe la Esperanto-movado en cara Rusio, do antaŭ la “Oktobra Revolucio”, sed koncentriĝas al la evoluo post tiu evento, kiu transformis la landegon en Sovetan Union, de kiu Rusio estis nur parto, fakte tamen la domina. Brigid O’Keeffe rakontas kaj analizas la sorton, kiun havis sovetiaj esperantistoj, gvidaj kaj ordinaraj, dum du jardekoj ekde 1917. Estis nur du jardekoj – sed kiaj ili estis!

La militon kaj la (post)revoluciajn perturbojn Esperanto ne nur transvivis, sed la rusia movado portempe eĉ mirinde prosperis, ne pli malbone ol aliaj grandaj landoj kun Germanio ĉepinte. Por pli bone komprenigi tion, la aŭtorino, antaŭ ol veni al la sovetia tempo, resumas la naskojarojn de la lingvo kaj la penan lukton de Zamenhof kaj la ruslandaj pioniroj por akcepto kaj rekono. Al la konataj faktoj, ekzemple pri la cara cenzuro aŭ la kontrasto inter rusaj kaj francaj pioniroj (kiun ŝi opinias iom troige prezentata), ŝi aldonas aspektojn, al kiuj malsamaj historiistoj – la zamenhofologo Edmond Privat kaj la novbolŝeviko Ernest Drezen – ne donis sufiĉan atenton, nome detaloj pri la efektiva disvastigiteco kaj uzateco de la lingvo.

Krom bazi sin sur ruslingvaj fontoj, ekspluatante la influajn revuojn *Ruslanda Esperantisto* kaj *Espero*, sed ankaŭ obskurajn varbbruŝurojn, ŝi utiligas arkivaĵojn ĝis nun neglektitajn. De la ruso Gennadij Tupicyn (1885–1966), kiu aktivis en la rusa, latva kaj usona movadoj, en Institucio Hoover en

1 Por esperantistoj la aŭtorino pretigis mallongan resumon de sia libro (O’Keeffe 2021).

Kalifornio konserviĝas korespondataĵoj, kiuj kovras kvardek jarojn, kaj centoj da poŝtkartoj el la tuta mondo, ĉio en Esperanto. Brigid O’Keeffe tiamaniere peras al ni la entuziasmon, de kiu en la regno etendiĝanta de Bjalistoko al Vladivostoko kaptiĝis la unuaj lernintoj de Esperanto: rusoj, belorusoj, ukrainoj, inter ili multaj judoj. Eble plej multe impresas la moderneco de tiuj pioniroj (notu, ke mi parolas pri antaŭrevolucia Rusio!). Inter ili superregis intelektuloj, apartenantaj al elito, kiuj komprenis sia tasko ebligi ankaŭ al ordinarioj partoprenon en la internacia vivo. Ili akordigis patriotismon kun kosmopolitismo kaj cetere tute ne hezitis dediĉi parton de siaj leteroj al la diskuto de aktuala politiko. En la anoncoj de korespondemuloj aperis interalie la deziro pridiskuti la demandon de virina egaleco.

Nur tre malmultaj havis la rimedojn por vojaĝi eksterlanden, ekzemple al Bulonjo en 1905 kaj al la postaj Universalaj Kongresoj. La pli multaj povis nur revii pri vojaĝado, sed al ili disponeblis formo de uzo, kiu estis tute malmultekosta: la korespondado. Per ĝi prezentiĝis la ŝanco mem proksimiĝi al si, per leteroj kaj poŝtkartoj, la mondon. La fruaj esperantistoj anticipis, komentas O’Keeffe, tion, kio estis karakteriza por la formiĝanta (tutgloba) vivo, nome la nepra deziro ne resti en la hejma malvasto, sed rigardi eksteren kaj scivole eltrovi novajn horizontojn. Legante interesajn, parte ĉarmajn detalojn pri la frua koresponda fervoro de rusiaj esperantistoj, ni ricevas inspiran enkondukon en la postan evoluon de tiu perkoresponda aktivado. Post la revolucio, en la sovetia epoko, Esperanto pluvivis – kun novaj defioj, kiujn la epokŝanĝo alportis por la vivo de la koncernataj homoj. La perspektivo de liberiĝo de la tutmonda proletaro helpis la formiĝon de Esperanto-kluboj, kies anoj entuziasme adoptis la devizon, ke la monda proletaro ankaŭ bezonas komunan, sennaciecan lingvon. Tiaj atendoj aŭ postuloj leviĝis ankaŭ en Komintern, la Komunista Internacio.

Rapide tamen montriĝis, ke la regantoj de Soveta Rusio estis komplete neinteresitaj pri Esperanto. Tiam, anstataŭ rezignacii, la esperantistoj proponis al la reĝimo siajn servojn. Ili kaptis ŝancon, kiam meze de la dudekaj jaroj la partio kaj Komintern deklaris la neceson, ke rusiaj kaj alilandaj laboristoj interligiĝu kadre de sistemo de laboristaj (kaj kamparanaj) korespondantoj. Tiun sistemon utiligis gazetoj, kiuj celis aŭ pretendis celi al pli da proksimeco kun siaj legantoj per raportoj rekte akiritaj de homoj “ĉe la bazo”. Komence utiligata unuavice por enlanda bezono, la partiaj propagandaj fakuloj malkovris, ke la sistemo povus utili ankaŭ internacie. Tio elektrizis la esperantistojn, ĉar ili konsciis ligan kun la propra tradicio, do la korespondado, kiu estis jam praktikata antaŭ la revolucio. Al kio la semoj estis metitaj en la cara imperio, tio freŝe disfloris sub la sovetiaj kondiĉoj, kvankam tiuj ĝenerale estis senprecedence limigaj. Mi citas (p. 125, traduko mia): “En kombino kun skribilo, papero kaj afranko Esperanto donis unikan

ŝancon transformi la propran sovet-patriotismon, sendi en ŝajne nedanĝera koverto la fajron de revolucio en la mondon.” Dum kelkaj jaroj Esperanto ĝuis popularecon kaj iom da oficiala subteno, ĝi promesis palpi la konturojn de la fora ekstera mondo. Kompletige ĝi helpis estigi kaj larĝigi inter okcidentaj laboristoj sciojn kaj konjektojn pri la ĉiutaga vivo de homoj en Soveta Unio.

Ŝlosila evento estis en 1926 la Sesa Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Leningrado, la sola internacia kongreso de esperantistoj okazinta en Sovetio. Sovietianoj povis unuafoje paroli kun eksterlandanoj, kun kiuj ili antaŭe interrilatis koresponde, kaj por la alilandaj partoprenantoj estis preskaŭ sensacia sperto helpe de Esperanto travojaĝi landon, kiu pretendis esti la ĝermo de nova civilizo, sed pri kiu malmulto estis konata. Salutmesaĝo de la popolkomisaro pri klerigo Anatolij Lunaĉarskij ŝajnis pruvi, ke en la okuloj de la reĝimo Esperanto promesis iom da utilo, ĉar ĝi helpis havigi substancon al la porrevolucia retoriko. Baldaŭ post la kongreso tamen ekaperis signoj, ke pasis la internaciisma eŭforio. En la korespondado la pozitivaj elementoj minacis malaperi aŭ malgraviĝis, ju pli ĝi ebligis la rigardon en aspektojn de la sovetia vivo, kiujn la potenculoj preferis kaŝi. Gazetoj, kiuj pli frue alvokis la esperantistojn disponigi specimenojn de interesaj leteroj ricevitaj el eksterlando, iĝis pli selektemaj rilate publikigotajn leterojn aŭ eĉ komencis preskribi la dezirindan leterenhavon. Partiaj funkciuloj esprimis dubon pri revoluci-stimula utilo de la Esperanta korespondado kaj riproĉis al la esperantistoj, ke la politike gravan korespondadon ili (mis)uzas por sia persona plezuro. Plej maltrankvilige estis, ke la korespondado ekirigis la fluon ankaŭ de “nekontrolebla scio” el eksterlando en Sovetan Union kaj inverse. Precipe ĝenis la regantojn faktoj pri la ĉiutaga vivo, kiuj estis ofta temo en leteroj; eltiraĵoj aperis en la rubriko “Tago el mia vivo” en *Sennaciulo*, la revuo de SAT, kiu ĝuste al ili dankis parton de sia populareco.

La sovetiaj esperantistoj ne tuj rimarkis, kian efikon je ilia diversmaniera agado havis la industriigo, kiu estis la kerna celo de la konstruo de socialismo sub Stalin. Ĉi-rilate la reĝimo en 1928 formulis la sloganon “Fremdajn lingvojn por la amasoj”. La esperantistoj reagis je tio malentuziasme. Ili komentis, ke evidente oni pensas unuavice pri la angla, germana aŭ franca lingvoj, kaj kritikis la eŭropcentrismon de la kampanjo. Kvankam ili ne forgesis reklami ankaŭ pri la propedeŭtika utilo de sia lingvo, estis evidente, ke por la antaŭenpuŝata industriigo Esperanto ne tre utilis, nek por la nuna Soveta Unio nek longperspektive por la komunisma estonteco. La kompatindaj esperantistoj, vokitaj al “teknika helpo” por fabrikoj aŭ eĉ al kolekto de mono por traktoro, kutime estis ĝis tiam tre memfidaj. Sed en ĉi tiu momento ili ne kuraĝis konfesi, ke ne eblas utiligi Esperanton por

la novaj taskoj de industriigo tiel efike, kiel oni provis fari en la periodo de mondrevolucia entuziasmo. Entute ofte ne eblis sin rapide adapti al la subitaj direkto-ŝanĝoj. Dum enlande Esperanto pli kaj pli reduktiĝis al niĉa pozicio, paradokse ankoraŭ ioman tempon daŭris altnivelaj teoriaj diskutoj pri la lingva situacio post la monda venko de komunismo. La sovetiaj esperantistoj longe provis spiti la malfavoran staton, celante konservi minimuman organizan stabilecon (kaj ricevi paperon por siaj eldonaĵoj), sed iliaj petoj pri subteno estis flankenŝovataj kaj ignorataj. En sia malespero, ili aŭdacis turni sin rekte al Stalin. Korespondado estis la sola kampo, en kiu ili povis vidigi iom da profilo, sed ĝuste ĝi fine iĝis la plej riska: la aŭtoritatoj ankoraŭ ne tute ĉesis agnoski ĝian utilon, sed senvalidigis eĉ moderan laŭdon per la juĝo, ke ne estas “sufiĉe da kontrolo” pri la “ideologia orientiĝo de la korespondado”.

De tie ne estis granda paŝo por atingi la konkludon, ke esperantistoj ne estas politike fidindaj. Neniam sukcesante liberiĝi de la suspekto, ke Esperanto altiras precipe etburĝojn, la esperantistoj fine eniris kategorion en la furiozanta batalo kontraŭ “malamikoj de la partio”, kontraŭ danĝeraj subfosantoj, trockiistoj, faŝistoj. La iam aklamatan proletan internaciismon anstataŭis atmosfero de ksenofobio. En la dua duono de la tridekaj jaroj la reĝimo pli kaj pli enfokusigis homojn kun kontaktoj al eksterlando, kaj tiel venis ankaŭ la vico de la esperantistoj. La gvidantoj estis mortigitaj, centoj da ordinaruloj malaperis en labortendaroj. Sekve de la malpermeso de organizita agado la esperantistoj povis tamen eviti la ekstremon de kompromitiĝo, en la senco, ke la subpremo ŝparis al ili evoluon, en kiu, krom por ĉiam sekvi la kaprican partian politikon, Esperanto estus uzata kiel batalilo en la ĉasado de partiaj malamikoj, eĉ por pravigi la transiron al kontraŭkosmopolitisma agitado kaj apenaŭ vualita grandrusa ŝovinismo. Poste, dum la regado de Leonid Breĵnev, venis pli trankvilaj tempoj, sed nur nelonge antaŭ la disfalo de Soveta Unio povis refondiĝi la antaŭmilita Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU). Sub Miĥail Gorbaĉov oni unuafoje eksciis la grandan, teruran dimension de la persekutoj de Esperanto en la tridekaj jaroj. La lingvo kaj movado neniam povis reakiri parton de sia iama populareco.

Fine de sia libro O’Keeffe mencias la aktivulinon Ida Lisiĉnik (1898–1983). Tio memorigas min pri tio, ke en la sesdekaj jaroj, kiam mi komencis interesiĝi pri la historio de la sovetia Esperanto-movado, mi ofte renkontis tiun nomon en *Nuntempa Bulgario* kaj aliaj revuoj. Mi ne povis eltrovi detalojn pri la persono. Nun mi scias, ankaŭ dank’ al O’Keeffe, ke la juddevena Ida Lisiĉnik naskiĝis en Kievo, lerninte Esperanton en 1912 membris 1500 laboristojn de Sebastopolo en SEU kaj entuziasme laboris por Esperanto ankaŭ postmilite, en Kartvelio. En 1973 ŝi deklaris, ke Esperanto donis al ŝi

la “plej feliĉajn tagojn de mia vivo”. La aŭtorino portretas ŝin kiel modelan kazon de kreema internaciisto. Al ŝi kaj similaj homoj Esperanto disponigis “vojon al tio, ke ili sentu sin hejme kaj konscie havu lokon en la mondo – eĉ se ili neniam vojaĝis trans la limojn de siaj hejmurboj, nacioj aŭ imperioj”.

En sia konkludo (p. 188) la aŭtorino mencias skeptikulojn, kiuj forĵetas Esperanton kiel “spektaklan malsukceson kaj flankenbalaas la esperantistojn kiel kuriozajn historiajn negravulojn”: ili “pretervidas, kion Esperanto povas helpi al ni kompreni pri tutmondiĝo”, ĉar per ĝi en Rusio jam ekde la fino de la deknaŭa jarcento eblis lingve interproksimigi homojn trans etnajn limojn kaj frue estigi diskuton pri la valoro de internacia komunikado, antaŭ ol la sovetia reĝimo provis ideologie uzurpi la terenon kaj persekutis, preskaŭ neniigis, la Esperanto-movadon.

Bibliografio

O’Keeffe, Brigid. 2021. “Plumamikoj kaj kvinjaraj planoj,” tradukis Kalle Kniivilä. *Beletra Almanako* 41: 97–100.

Pri la recenzanto

Ulrich Lins estas germana historiisto, kies studo pri la persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado (1988, 2016), estas tradukita en ok lingvojn.

Retadreso: u.lins@gmx.net

About the reviewer

Ulrich Lins is a German historian whose work on the persecutions of the Esperanto movement has been translated into eight languages.

Über den Rezensenten

Ulrich Lins ist Verfasser des Buches *Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin* (1988).